INFORMADO KOSTAS MONON!
Subtenu la informadon !

**PILO-PRESS**
Interncia Informservo

N-ro 32/1972 17 okt 1972
Aperas ĉiusemajne

Jara abonkotizo
20,-- GM

Pĉk. Nürnberg
819 56

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

DAILY EXPRESS Wednesday October 11 1972

# By George—it could be the talk of Europe!

THE APPOINTMENT of former Labour Minister **George Thomson** as one of our two European Commissioners in Brussels has raised the aspirations of supporters of Esperanto, the international language.

Mr. Thomson learned Esperanto as a boy. In 1958 he addressed British Esperantists at their Notting Hill headquarters.

As recently as a week ago it was decided to ask him to be chairman of a group of M.P.s being formed to press for the adoption of Esperanto as the Common Market language.

## Excited

His Brussels job makes this appointment impossible. But it has led to excited international chatter (in Esperanto of course) that this could mean the opening of new doors for the language.

Allies are already within.

**william hickey**

West German Chancellor **Willy Brandt** is a known supporter. And the cause cannot but gain from **M. Pompidou** of France's animosity towards English as the official language for the European community.

**Herbert Platt**, German-born secretary of the Esperanto Association in London, tells me: "We have been trying for decades to make Esperanto the international language of the world. If Mr. Thomson can help. . . ."

My favourite **Esperanto** story concerns **Harold Wilson**. Down a mine on a visit Mr. Wilson spotted a man wearing the green star of the Esperanto Association.

Mr. Wilson, who learned the language as a boy, immediately launched into a sentence.

Back came a reply — in Esperanto.

At which point Mr. Wilson admitted that he could speak it a bit—but not understand it!

## La brita reprezentanto en la KOMUNA MERKATO favoras Esperanton

Londono. (eps) La brita registaro ĵus anoncis la alelekton de George Thomson kiel unu el la reprezentantoj de Britujo en la Komuna Merkato.

S-ro Thomson estis Ministro kun speciala respondeco pri la Komuna Merkato en la lasta registaro. Laŭ letero ricevita de li antaŭ nelonge li favoras la internacian lingvon Esperanto.

**********

Kune kun tiu supra informo Pilo-Press ricevis de la BEA-sekretario Herbert Platt la apudan eltranĉaĵon el la brita gazeto DAILY EXPRESS de la 11 okt 72, en kiu la ĵurnalisto William Hickey raportas pri la elekto de s-ro Thomson por Bruselo. En tiu kunteksto li citas Pompidou kaj Willy Brandt. Laŭ nia opinio la anektodo pri Harold Wilson kun la iomete negativa fino ne povas malgrandigi la efikon de tiu artikolo en brita gazeto.

**************

Pilo-Press ĝojas, ke ĝi denove povas prezenti aktualan informon el la brita gazetaro en kunlaboro kun britaj esperantistoj!

Pliajn informojn el Britujo bonvolu legi sur alia loko de ĉi tiu eldono!

## La plej nova famo - Das Jüngste Gerücht

Jam en n-ro 29/1972 paĝo 4, Pilo-Press raportis pri la informo de la germana ilustrita revuo "Stern", n-ro 40, 24 sep 72, pri la planita blasfema fakvortaro en E-o. Hodiaŭ ni fine publikigas la originalan informon en "Stern". "Das Jüngste Gerücht" estas konstanta rubriko de la revuo, en kiu publikiĝas diversspecaj informoj !

**Das jüngste Gerücht** — **stern**

Anhänger der internationalen Sprache Esperanto bereiten ein Schimpfwörter-Lexikon vor. Die künstliche Sprache kannte bisher keine Schimpfworte. Rund eine Million Menschen in der Welt sprechen inzwischen das 1887 von dem Warschauer Augenarzt Zamenhof als »völkerverbindende Sprache« geschaffene Kunstidiom.

## Esperanto - Lingvo de la Sporto

Budapeŝto - Nurenbergo (PP) Tibor Ujlaky-Nagy, la aŭtoro de la gravega verko "La sporta lingvo de Esperanto", eldonita de Hungara Esperanto-Asocio, skribis pri la broŝuro "Esperanto - Lingvo de la sporto" jene:

"Bonorde mi ricevis la du ekzemplerojn de Via sporta eldonaĵo 'Esperanto, lingvo de la sporto' kaj la ĉi-aŭgustan n-ron de Germana Esperanto-Revuo. Koran dankon pro Via komplezo.
Kun ĝojo mi vidis tiujn terminojn, kiuj en ambaŭ verkoj estas la samaj /precipe la nomoj de la sportobranĉoj/. Kie estas videbla diferenco /ekz. ĉe la nomado de la pezkategorioj/ tie certe trovos la ĝustan vojon la ĝenerla uzado.
La broŝuro impresas bone, al kio mi kore gratulas, kaj esperas, ke ĝi vekis la merititan atenton de multaj olimpikaj sportistoj kaj funkciuloj.
Dankante Vin pro la harmonia kunlaboro mi salutas Vin kore kun sinceraj bondeziroj

sign. Tibor Ujlaky-Nagy"

*********************

Kelkaj legantoj de la broŝuro "Saluton amiko" sendis proponojn, kritikojn ktp pri la enhavo kaj la formo de la broŝuro. Ni dankas kaj traktos serioze ĉiujn alskribojn por la nova eldono.

*********************

Pfälzer Turnerbund, Gimnastika Asocio de Palatinato, Kaiserslautern, dankis al la Esperanto-Centro Rheinland-Pfalz, Neustadt, pro la informo pri la sporta broŝuro de ambasadoro Ralph Harry. Laŭ la letero de la 27 sep 72 la gimnastika asocio informis la prizorgantojn de la sportjunulara tendaro okaze de la olimpiaj ludoj en Munkeno pri Esperanto.

*********************

"kultur-ring" revuo de kulturaj asocioj de Hanovro, raportis en la oktobra numero, 10/1972, pri la esperantista agado dum la olimpiaj ludoj en Munkeno sub la titolo "Olimpiado kaj Esperanto" laŭ Pilo-Press-informoj.

*********************

## Nova konkurso de Pola Radio

Varsovio (PP) Pola Radio, Esperanto-Redakcio, aranĝas novan konkurson por siaj eksterlandaj aŭskultantoj pri la la temo "Paca kunlaboro kaj rilatoj kun Pollando". Por partopreni la konkurson oni devas respondi al unu el la tri demandoj:

1) Kion laŭ via opinio oni devas speciale entrepreni por pli disvolvi la pacan kunlaboron.
2) Kiuj eventoj aparte kontribuis al la evoluo de la kunlaboro inter Pollando kaj via lando.
3) En kiuj sferoj ekzistas la plej grandaj eblој por disvolvi la kunlaboron de niaj landoj.

Limdato por la respondoj estas la 31.12.1972. La precizan tekston por la demandoj petu de Pola Radio, E-Redakcio, POB 46, Varsovio, Pollando, al kiu oni ankaŭ sendu la respondojn!

Novaĵoj el Koreio

Seulo (TG) De la 1 - 25 aŭg 1972 okazis Esperanto-kurso ĉe Meong-Ji-Universitato organizita de Studenta Asemblo de M.J. Universitato. Partoprenis pli ol 160 personoj. La kurso okazis ĉiutage kaj post la kurso oni regule kunvenas dufoje monate, ĉiujn duan kaj kvaran sabaton ĉe M.J.Universitato, je la 3a horo pm.

**********

Prof. Taekeng GIM havis intervjuon kun MBC-TV la 11 aŭg 1972 kaj prezentis Esperanton dum 30 minutoj. Estis bonega reago.

**********

Prof. KIM pri Pilo-Press:

Kun ĝojo mi ricevas kaj legas Pilo-Press, kiun vi sendas al Korea Esperanto-Societo, kaj per la letero mi kore kaj varme gratulas vin por via inda laboro!

+++++++++++

Demando en la Brita Parlamento pri Esperanto

Londono (eps) "Ni konscias pri la pretendoj kiujn oni faras por Esperanto kiel internacia lingvo, sed estas la respondeco de edukaj instancoj decidi ĉu ĝi devos esti instruata en iliaj lernejoj", estis la skribita respondo de la Ŝtatsekretario por Skotlando, Gordon Campbell, je la demando de parlamentano Gourlay pri la avantaĝoj de Esperanto kiel internacia lingvo kaj eventuala instrufako en la elementaj lernejoj.

Esperanto-Lekciisto en la Universitato de Liverpool

Liverpool (eps) La Universitato de Liverpool anoncis la elektiĝon de d-ro Bernard M. Cavanagh, M.A., D.Sc., Londono, kiel lekciiston pri Esperanto. D-ro Cavanagh, kiu ĝis antaŭ nelonge estis prezidanto de Brita Esperanto-Asocio, antaŭvidas, ke li okupiĝos dum unu tago ĉiusemajne, donante lekciojn en kurso pri Esperanto.

Ĝemelitaj kluboj.

Valenciennes (LGx) Ekde la ĝemeliĝo de la klubo kun la E-klubo de Düren, okazas ĉiujare amikaj franc-germanaj renkontiĝoj, alterne en Francujo kaj Germanujo.

Markola kongreso

Folkestone (LGx) Respondeculoj el Britujo, Belgujo kaj Francujo preparas internacian markolan renkontiĝon de la 28 apr - 1 maj 1973. Informojn donas: J.C. Rapley, 156 Wanstead Park Road, Ilford, Essex, Anglujo.

Germana Esperanto-Revuo

Nurenbergo (PP) Ĵus aperis n-ro 6/1972 de Germana Esperanto-Revuo kun raportoj pri la esperantista agado dum la olimpiaj ludoj en Munkeno, referaĵo de ambasadoro Harry pri "Esperanto - lingvo de la sporto", pri la SAT, HELI kaj IKUE kongresoj, pri la SUK-kursoj kaj Esperanto programita. Jean Forge prezentas "Buntan Intervjuon" kun "Grumblulo". Abonantoj novaj por 1973 ricevas senpage la restajn numerojn de 1972. Abonkotizo 13,- GM.

Jugoslavio invitas

Aliĝu al la 58-a Universala Esperanto-Kongreso en Beogrado. Ĝis la 31 dec 1972 validas la rabatitaj kongres-kotizoj. Aliĝu tuj kaj ŝparu monon! Petu la oficialan informilon kaj detalajn informojn ĉe la UK-peranto, Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113

************

Polaj eldonaĵoj

Nikolao Kopernik Torunano, faldfolio pri la pola astronomo, kies 500-an datrevenon oni festos venontjare. Por la legantoj de Pilo-Press oni rezervis 200 ekzemplerojn. Mendu tuj ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Box 46, Varsovio 1, Pollando.

"KOSZALIN INVITAS VIN!", kvarpaĝa esperantlingva informilo pri la pola urbo Koszalin. Petu senpagan ekzempleron ĉe Informacji Turystycznej, ul. Drzymały 1, Koszalin, Pollando.

Radio-Vortaro de Esperanto havebla ĉe Pola Radio

En la kadro de leterkestoj la E-redakcio de Pola Radio disaŭdigas "Radio-Vortaron de Esperanto". Jen ni prezentas ekzemplon:

"EKSPOZEO - "Ekspozeo" estas parolado de ĉefministro aŭ ministro antaŭ la parlamento, plejparte post la starigo de nova registaro, prezentanta la ĝeneralan politikan linion kaj ankaŭ planojn kaj intencojn de la registaro por la proksima estonto. La vorto "ekspozeo" devenas de la franca "exposé". Ĝi ne troviĝas en la "PIV". En niaj elsendoj la vorto "ekspozeo" estas uzata jam de pli ol 10 jaroj.

**********

La semajno en la radio (PP)

Pekino. Por germanaj aŭskultantoj kompreneble estis interesaj la pekinaj elsendoj pro la vizito de ministro Scheel en Pekino. Dufoje Pekino raportis pri la vizito, tamen nur koncize kaj ne en unua loko. Tamen oni akcentis la "amikecon dumjarcentaj inter la germana kaj ĉina popoloj". Konkreta rezulto de la vizito estas la ekligo de diplomatiaj rilatoj inter Pekino kaj Bonn. - Varsovio. Detale raporti pri la Varsoviaj elsendoj ne eblas pro spacomanko. La ĉiutagaj du duonhoraj elsendoj prezentas amason da materialo por diskuti. La politikaj komentarioj ĉifoje okupis sin pri la partiaj kongresoj de CDU kaj SPD. Kaj mi nur povas substreki la objektivecon, kompreneble polemikan, de la komentarioj. Pri la anoncita nova konkurso legu aliloke. La kongresajn regularojn oni petu de la E-redakcio. Tamen laŭ anonco de la redakcio la konkursa regularo ankaŭ aperos en formo de anonco de Heroldo de Esperanto kaj Germana Esperanto-Revuo. La intervjuoj de la E-Ekspreso estis dediĉitaj al la "Ora Aŭtuno" en Miedzegorze. - Zagrebo. En la kutimaj novaĵoj el Jugoslavio oni povis aŭdi pri la protesto de jugoslaviaj organizaĵoj kontraŭ la kriminaciaj agoj kontraŭ slovenia minoritato en Karintio, Aŭstrio.- Detala raporto pri la ĵus finiĝinta Pupteatra Festivalo en Zagrebo. Dum ok tagoj oni povis rigardi 30 prezentadojn de trupoj el 7 landoj en Esperanto. La 1an premion gajnis jugoslavia teamo.